

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 11 (26), Novembro 2006

**Adreso (provizora):**  
**Esperanto Societo de Ŝikago**  
**p/a Viktor' Pajuk**  
**8228 O'Connor Dr., # 2F**  
**River Grove, IL 60171**  
**(773) 344-2276**  
**www.esperanto-chicago.org/**

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;  
Familia \$30; Regula \$20;  
Studenta aŭ pensiula \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society.  
Check should be payable to the **Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our Treasurer, **Charles Gunn**, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607

## Kunvenoj:

Membroj de La Ŝikaga E-Societo kunsidas la kvaran mardon de ĉiu monato en:  
**Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Bonvenon!

Dum la lasta oktobra kunsido de nia Societo oni devus nomumi kandidatojn por oficaj postenoj en estraro, sed kunveno decidis, konsiderante Art. VI.3 de nova redakcio de la Statuto pri du-jara ofic-periodo, organize elektadon post unu jaro. Due, en la jaro 2007 la Bultenon legos nur membroj de la Societo (kiu pagos kotizon) aŭ oni povas aboni la bultenon kontraŭ \$6.00/jare (Art. VIII.3).

Fine, ni sincere kaj tutkore gratulas la **Milanan E-klubon** okaze de la unua centjariĝo. Sukcesojn sur la Verda tereno! *Ŝikaganoj*

## Milana E-klubo – 100 jara!

La 1a UK en Boulogne sur Mer (1905) havis grandan eĥon ankaŭ en Milano, kie aperis artikolego en ĵurnalo “Corriere della Sera”. Tuj en la urbo estis personoj kiuj interesiĝis pri tiu ĉi, naskiĝis eta movado organizita de la angla pastro, poeto kaj klerulo, Clarence Bicknell, jam de longe loĝanta en Italio, en Bordighera apud la Liguria Maro. Li en la decembro de la jaro 1906, kune kun la bohema instruistino Rosa Junk starigis la “Milana Grupo por Esperanto”n, kies aktiveco efektiviĝis per multenombraj kursoj. En 1911 fare de la studento Pier Carlo Monti kaj aliaj liaj kolegoj en Milano estis fondita la Esperanto-Konsulejo por la Italaj Universitatoj, celante propagandi Esperanton inter la kleraj klasoj. Post du jaroj la du grupoj kunfandiĝis elektante la nomon de “Circolo Esperantista Milanese”, kies sidejo estis ĉe milana stenografia lernejo. Oni ekeldonis monatan revueton “Milana Esperantisto”. La saman jaron okazis publika propaganda prelego fare de la veneta pastro Giacomo Bianchini, en kiu partoprenis la fama milana Kardinalo Ferrari. En 1913 CEM eĉ sukcesis organizi la 4an Nacian Kongreson, kiun partoprenis multnombraj s-anoj, pluraj urbaj aŭtoritatoj kaj kelkaj eksterlandanoj. Pro la favora loka situacio Milano estis elektita sidejo de Itala Esperanto-Federacio.

Post la paŭzo de la mondmilito Esperanto renaskiĝis. En 1919 Milana Komunumo anoncis prelegon pri ĝi fare de prof. Lupi, profesoro ĉe Teknika Lernejo kaj 500 estis la aŭskultantoj. Post tiu prelego oni restarigis la asocion sub la nomo de “Esperanta Domo” kies sidejo estis ĉe komunuma lernejo, afable disponigita de la Komunumo. Ĝia prezidanto estis d-ro Filippetti, la estonta urbestro de Milano

Bedaŭrinde en 1923 faŝismo estris Italion kaj Esperanto estis forigita de la lernejoj. Sed la propaganda agado restis tre vigla: en la jaro 1931 oni starigis je la centro de Milano la “Esperanto Centro Itala”, kreaĵo de fama s-ano inĝ. Rinaldo Orenge. Ĝi fariĝis la centra motoro de itala E-



## UTILAJ RET-ADRESOJ:

UEA – Universala Esperanto Asocio  
<http://www.uea.org>

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)  
<http://www.esperanto-usa.org/>

Free Esperanto Course on Internet  
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/angla/index.htm>

Internacia televido en E-o  
<http://internacia.tv>

Reta senpaga enciklopedio  
<http://eo.wikipedia.org>

Esperantic Studies Foundation  
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo  
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

Pola Radio en Esperanto:  
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

agado. Oni prizorgis la eldonadon de nacia oficiala organo “l'Esperanto”, aranĝis karavanojn por partopreni en la UKoj, helpis organizi la naciajn kongresojn, ekskursojn, ekspoziciojn, specialan standon ĉe Milana Foiro, publikigis artikolojn, ktp. En Milano eĉ naskiĝis amatora teatra trupo, la sama kiu poste rolis en la komedio de Goldoni “Kurioza okazaĵo”.

Sed denove nigraj nuboj aperis je la horizonto, kaj de 1936 jaro post jaro malfacilaĵoj kreskadis: oni malpermesis al ŝtataj instruistoj estri E-kursojn, la ĵurnalo “l'Esperanto” devis ĉesi sian aperadon pro nericevo de porciumita papero, la kvartalaj kluboj estis fermitaj pro superaj ordonoj, Itala E-Centro devis fermi pro financaj kialoj, la dua mondmilito paralizis kvazaŭ ĉion.

Post la milito kelkaj milanaj s-anoj klopodis denove vivi la movadon kaj la 15an de junio 1946 ili starigis denove la “Milana Esperanto-Klubo”n. 1972 – Itala E-Federacio denove translokiĝis al Milano, 1984 – la milananoj organizis sukcesan Nacian Kongreson. Fine, ekde 1991, en ĉiuj neparaj jaroj, Milana Klubo organizas “Interregiona E-Kunveno”n, kies programo kunigas turisman, kulturen kaj asocian erojn kaj temojn. Do, ili jam okzis ok fojojn. La 10an de Nov. 2006a oni celebras la 100jariĝon de Esperanto en Milano kaj de ĝia klubo, kiu, ŝanĝante kelkfoje sian nomon kaj malgraŭ du mallongaj paŭzoj pro mondmilitaj kialoj, daŭre agadas por ĝi.

Oni nur povas imagi, kiel pasos la celebrado en *SantAmbrogio*:

Estis ĥoro de Verdi, ĥor' al Dio  
de l' Lombardoj mizeraj, soifantaj;  
la: "O Signore, dal tetto natio"<sup>6)</sup>;  
ĝi multajn brustojn igis ekflamantaj!  
Nun en mi mem jam ekŝanĝiĝis io,  
kaj, kvazaŭ tiuj aĵoj fariĝantaj  
estus gentanoj nun de ĉi popolo,  
en la gregon eniris mi sen volo.

(el G. Giusti trad. U. Broccatelli)

## Sekvantaj kunsidoj:

**28an de Novembro** – d-ro Ronald J. Glossop parolos pri *Esperanto kaj Mondcivitaneco*; la estrar-raporto.

## 17an de Decembro Zamenhofa Bankedo 2006


okazos en **Reza-a** restoracio (persa kuirarto): **5255 N. Clark St., Chicago, IL 60640**. Kondiĉe ke ni estos 25-kapa la prezo estos **\$25** kaj en salono sidos nur ni. Bufeda tablo kun vegetarana elekto + glaso da vino. Parkejo rezervita. Estrino lernis Esperanton en Irano!

## Nin invitas

– Litova E-Asocio invitas partopreni la 43-ajn Baltiajn E-Tagojn, dediĉata al 80-jariĝo de Esperanto-movado en Siauliai, kiu funkcios la 14-22-an de Julio, 2007. Vidu retejon de LitEA [www.esperanto.lt](http://www.esperanto.lt).  
– Tut-Amerika kongreso de E-o okazos en Kalgario (Calgary), Kanado, la 20-26an de Majo, 2007. Plua informo de: [www.take7.ca](http://www.take7.ca)



De la tuta mondo kolektis novaĵojn, salutojn kaj anoncojn via obeema servanto (kaj redaktoro)

 araneoesp @ yahoo.co.uk